

La 12an de novembro 2013

Kiel vivas birdoj en Fukuŝima?

Mi estas membro de la Societo de sovaĝaj birdoj, kiu agadas por protekti birdojn. Mi ne estas diligenta membro, nur pagante kotizon kaj legante la organojn. Venis malgrana informo pri birdoj en Fukuŝima. Mi tradukos ĝin.

Faŭno ŝanĝiĝis

Pro la nuklea akcidento, loĝantoj rifuĝis al aliaj urboj, do ili ne povas zorgi pri siaj kampoj. En tiuj kampoj kreskas herbaĉoj. Malaperis hirundoj, dume aperas fazanoj kaj alaŭdoj, kiuj ŝatas loĝi en herbejoj. Ĉirkaŭ la senhomaj domoj aperas aproj kaj simioj. Sovaj animaloj plivastigas sian teritorion. Ili vivas sub la influo de radioaktiveco.

Nestoj estas poluitaj

La Ministerio de medio mezuris kvanton de radioaktiveco de la nestoj de hirundo trovitaj en la urboj Ookuma kaj Namie situantaj proksime de la Nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kaj detektis maksimume 1,4 milionojn da bekereroj da radioaktiva cezio por unu kilogramo (Bq/kg). Ankaŭ la Asocio detektis 1,3 milionojn da Bq/kg el nestoj de paruoj.



*La registaro decidis la maksimuman limon de la kvanto de bekereroj pri manĝaĵoj jene en aprilo 2012 :

Ĝeneralaj manĝaĵoj (grenoj, legomoj, viando, ovoj, fiŝoj):

	100 bekereroj
Lakto :	50 bekereroj
Trinkakvo :	10 bekereroj
Nutraĵoj por beboj :	10 bekereroj

Nutraĵoj estas poluitaj

En la kolonio de egretoj en Fukuŝima oni detektis meznombre 102 Bq/kg da cezio kaj maksimume 157 Bq/kg el manĝaĵoj donitaj al iliaj idoj kiel ranoj kaj kobitidoj. Radioaktivaĵoj ciklas en la ekologia sistemo kaj pli kaj pli densiĝas.

Enkorpa radioaktiva poluiĝo de sovaĝaj birdoj

El du mortintaj paruoj en la arbaro en Fukuŝima oni detektis 730 Bq/kg kaj 200 Bq/kg da cezio. El mortinta hirundo oni detektis 181 Bq/kg da cezio. Jam parto de la birdaro estas poluita de radioaktiveco.



Aperas hirundoj kun blankaj makuloj

En la vilaĝo Iitate kaj la urbo Minami-Sooma oni trovis hirundojn kun blankaj makuloj ĉe la gorĝo. Oni diras, ke simila afero okazis en Ĉernobil.

(Foto : blankaj makuloj sur la bruna parto de la gorĝo)

La Asocio antaŭvidas, ke la influo de la nuklea akcidento daŭros longe al sovaĝaj birdoj, kaj petas kunlaboron de la membroj por pli da esploro.

(Fino de la unua raporto)

Ratoj regas la senhomajn urbojn

« Ĉu la kato estas nigra aŭ blanka, tio tute ne gravas. La plej bona kato estas tiu, kiu kaptas ratojn », diris Deng Xiaoping, la fama gvidanto de Ĉinio en 1980-aj jaroj. Tamen en Japanio neniu katoj kaptas ratojn, ĉar en nia ĉiutaga vivo ni neniam renkontas ratojn. Tamen ili vivas ie kaŝite.

En la senhomaj vilaĝoj kaj urboj najbare de la Nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, preskaŭ ĉiuj domoj estas difektitaj de ratoj. S-ro Iŝida Kinee, 75-jara, diras malĝoje: « Mi jam perdis volon purigi la domon ». Kiam li revenas al sia domo, ĉiam li trovas la ĉambrojn nigraj pro fekaĵoj de ratoj. Ratoj fekas ĉie kaj mordas litaĵojn kaj meblojn. Komence li uzis ratmortigilon, sed tio tute ne efikis, kaj nun li nenion faras kontraŭ ratoj.

Ĉiuj loĝantoj spertas same kaj pli kaj pli perdas volon reveni al sia hejmo, vidinte mizeran staton de sia kara hejmo.

La urbo volas forpeli ratojn, sed ĝi ne havas sperton pri tio, ĉar antaŭ la akcidento ankaŭ en tiuj urboj ratoj malofte aperis. La urbaj funkciuloj diras: « Ni devas trovi kontraŭrimedojn kontraŭ ratoj. Se la loĝantoj rezignus reveni hejmen pro ratoj, tio estus grava afero. La urbo malaperos ». Tamen ĝis nun ili ne sukcesas. Iu profesiulo diras: « Jam aproj kaj ratoj tiel disvastiĝis, ke estos neeble eksterni ilin ».

(el la ĵurnalo Fukuŝima Minpoo, la 23an de oktobro 2013)

Loĝantoj rajtas reveni hejmen por purigi kaj bonordigi la domon, sed malpli kaj malpli da loĝantoj revenas, perdinte esperon. Antaŭe la registaro intencis revenigi ĉiujn loĝantojn al sia hejmo, puriginte la ĉirkaŭaĵon, sed nun ĝi decidos, ke loĝantoj en iuj partoj de tro poluitaj lokoj ne revenu. Ratoj helpas al ĝi, pli efike rezignigante al la loĝantoj la revenon. Dank' al ratoj la registaro povos ŝpari monon por purigado.